

sinkonscio de tiuj reprezentantoj de la tria socia tavolo. La servistoj jam ne kontentiĝas de ilia socia situacio. En la verkoj de plej talentaj komediverkistoj de tiu epoko ("Le légataire universel" de Regnard, "Turcaret" de Lesage) ili strebas fari socian karieron kaj intrigas plejparte en siaj propraj interesoj. Tiamaniere estas preparata la apero de Figaro de Beaumarchais, kiu personigas plej bonajn trajtojn de franca popolo ("Le mariage de Figaro"). C. Lenient, analizante la literaturon de tiu epoko, venis al la konkludo, ke "la historio de la komedio iĝas por mi la historio de nuntempa socio ne nur dank' al la tipoj, kiuj aperas en ĝi, ne nur dank' al la absurdaĵoj kaj mankoj, kiujn ĝi primokas, sed ankaŭ dank' al tiuj ideoj, kiujn ĝi proklamas"⁴. Novaj ideoj videblas aparte bone en la komedioj en la pritrakto de tipoj de servistoj.

Adreaso de la autorino: Ljudmila I. Mursalijeva
Katedro de Filologio
Baŝkiria Ŝtata Universitato
GUS 450077 UFA - 75
Ul. Bluĥera 4/1-85
RUSIO - BAŜKIRIO

⁴ Lenient C. "La comédie en France au XVIII s.", v. 1, Parizo, 1888, p. VI.
Rig. ankaŭ: Calame A. "Régnaud . Sa vie et son oeuvre", Alger, 1960; Blanc A. "La comédie française à l'heure du soleil couchant. Dancourt"; Moureau F. "Un singulier moderne. Dufresny", Lille, 1979 kaj aliajn.

RIMARKOJ EL IZOLULA ANGULO

RADOSLAW NOWAKOWSKI (PL)

Mi ne estas esperantisto -

ĝuste pro tio, ke laŭnature mi estas izolulo, kaj al mi faras ete abomenon ĉiu ajn grupiĝado, en kiu oni devu poste vivi laŭ komune elpensitaj sloganoj.

Tamen mi lernis (kaj daŭre lernas) tiun ĉi lingvon samkiel kelkajn aliajn kaj mi uzas ĝin. Plimulto da miaj verkaĵoj estas verkitaj dulingve: en la pola kaj en esperanto.

Iam, antaŭ longe, mi imagis la jenan situacion: se ĉiu verkus siajn tekstojn gepatrolingve kaj esperante, ili ne devus esti tradukitaj (supozante ke esperanto estus vaste konata kaj uzata); plie: ĉiukaze ni havus la version originalan, aŭtoran, do la plej autentikan, ĉar tradukaĵo estas nur ia proksimumo, io kvazau foto de la pentraĵo (kompreneble tiuj konsideroj rilatas pli al tekstoj artaj ol sciencaj kaj teknikaj). La plej lerta tradukisto ne divenos plene la intencojn de la aŭtoro; neniu povas pli multe, pli koreme, pli freneze perdiĝi en la labirinto de vortoj kaj frazoj ol tiu kiu ilin verkis.

Kaj plu: tekston oni necesus traduki nur unufoje - nekredebla ŝparo da tempo kaj energio, kompreneble ne por l'aŭtoro, kiu devas prepari du tekstojn anstataŭ nur unu. Tamen li ankaŭ havus profiton, nome la teksto estus tuj legebla por preskaŭ ĉiuj supozante ke ĉiuj konus esperanton; interese estus scii kiujn profitojn havus armeo da naturlingvaj tradukistoj, kiu iĝus senlabora.

Vere freneza kaj fola ideo. Bonŝance mi ne sukcesis iluziiĝi, ke dank'al tiu ĉi ideo miaj libroj estos legataj tutmonde. Ne eblos pro jena kialo: ili estas farataj mane en ekstreme malmulta kvanto. Malgraŭ tio la frenezeco de l'ideo estis neniel fuŝita. Belaj estas tiaj foloj. Belaj kaj ĉastaj, ĉar bezonataj de neniu. Same kiel bela kaj ĉasta kaj de neniu bezonata povas esti soluleco.

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Esperanto estas por mi, antaŭ ĉio, nur lingvo. Simpla, facila, rapide lernebla, sufiĉe elasta kaj sufiĉe nekonsekvenca kaj nebuluma por esprimi sufiĉe precize diversegajn pensojn kaj sentojn. Pli neutrala ol iu ajn lingvo, kio ne signifas absolute kaj plene neutrala. Pro sia strukturo aglutina ĝi similas al la lingvoj bantuaj, vortaro devenas ĉefe el la lingvoj indoeuropaj. Sed ĉinoj ne plendas multe kaj lernas esperanton kelkfoje pli rapide ol la anglan.

Nur - esperantistoj volas savi la mondon pere de esperanto, same kiel vegetaranoj pere de sendianda manĝado, samkiel la verdaj pere de biciklado. Ĝis nun iuj provoj savi la homaron kaj enparadizigi ĝin rezultis al neimageblaj, sed realaj suferoj, masmurdoj, ekstermino de nacioj, detruo de tutaj kulturoj kaj tradicioj. Enkonsiderigas kaj terurigas tio, ke ni tamen daŭre ekprovas. Tial mi pensas, ke ia ajn ideologiigo de esperanto estas ege necesa kaj eĉ danĝera miskompreno, kaj diskutoj, ĉu nudistoj povas esti esperantistoj, au konstatoj, ke la verdaj devas uzi esperanton, mi konsideras kiel absolute sensecaj. Se esperanto estu la lingvo universala ĝin povas (sed nur *povas* neniam *devas*) uzi iuj: verdaj, ruĝaj, blankaj, nigraj, celadonaj, oraj, brunaj, sanktuloj kaj fiuloj, maldekstremuloj kaj neonacistoj; estas bedaŭrinde, sed en tio konsistas universaleco - tamen: necesas toleri netoleremulojn ?

Bedaŭrinde antaŭ ĉio estas ke homoj amas ideologiojn. Homoj bezonas ideologiojn, elpensas kaj amas ilin kaj ne povas vivi sen.

El tiu kialo ideologio nestiĝis ankaŭ en ekologio. Ne temas pri l'intenco savi la homaron pere de biciklado, temas pri preskaŭ monstra demonigo de la homo precipe okcidenta. Oni povus demandi ĉi-momente kiun kulpigi pro grandega mortado en permo antaŭ pli ol 200 milionoj da jaroj; kiun kulpigi pro violenta kaj rapidega malplivarmigo de la klimato en la mezepoko kiu pereigis la vikingan kolonion sur Grenlando? Tiel nomata "harmonia kunekzistado kun la naturo" ŝajnas esti dependa nur de propra detrua malpovo, ne de ia "konscio ekologia". Malprofitis esperanto komplotante kun diversaj ideologioj, estus domaĝe se ankaŭ ekologio tiel suferus kaj malprofitus.

Sed la homoj amas ideologiigi. Ideologiado konsistas, inter alie, en tio ke anstataŭ vidi la mondon tiel kiel ĝi estas, ni volas ekvidi ĝin tia kian ni

volas ke ĝi estu. Kredo anstataŭas scion - kaj nescion. Estas pli facile vivi kredante ol sciante - au ne sciante. Tamen, plifaciligado povas esti multekosta kaj malprofita kaj povas finiĝi tragike.

Do eble anstataŭ kredi, ke esperanto savos la homaron estas pli bone scii ke ĝi devus esti almenaŭ lingvo helpa, kroma, dua. Absolute ne temas pri anstataŭigi la lingvojn naturajn per lingvo planita. La turo Babel estis artaĵo.

Se esperanto anstataŭos lingvojn naturajn ĝi spertus la sorton de la latina; ankaŭ angleparolantoj komencas havi problemojn kun diversaj dialektoj. Oni devas konsideri la fakton, ke lingvo ne estas nur unu el la manieroj de interkomunikado - lingvo estas kvazaŭ filtro pere de kiu ni perceptas la mondon. Homoj uzantaj diversajn lingvojn vivas je diversaj mondoj, kio ne ekskludas ekziston de universalaj. Detruo tiujn mondojn diversajn ne nur malpliriĉigus nin kulture, sed iel malpligrandigus niajn ŝancojn ekkoni la mondon. Kaj se ni volas konservi la mondon kiel ĝi estas, ni devus eĉ zorgi pri ĉiuj ajn malpurajoj, malĉastajoj, fiaĵoj, aĉaĵoj. Distingoj kiel bona - malbona, utila - malutila, ĉasta - malĉasta malvalidas por la naturo kiel sensecaj. La jenaj eldiraĵoj: "Unu amo kaj unu kredo helpu vin unuigi la disrompitan mondon en unu gregon je unu paŝtisto. Unu supernacia lingvo - esperanto - ankaŭ efike servu por tiu ĉi nobla celo" (Karol Wojtyła en sia mesaĝo sendita al Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en 1977) terurigas, samkiel terurigas vizio de totala au totalisma kultura unuigado kaj samigado de mondkonceptoj.

Memkomprene estus naive atendi ke ĝuste la eklezio katolika proponu la version: multaj kredoj - multaj paŝtistoj. Du jarmiloj konsekvenca kaj kruela senpardoneco (ekstermante sen iuj skrupuloj kaj konscienciproĉoj tutajn civilizaciojn kaj tradiciojn) strebegas ankaŭ hodiaŭ realigi la principon *unu kredo - unu paŝtisto*.

Esperanto kontraŭe devus havi neniujn aliajn celojn ol kontribui al interkomunikado inter homoj parolantaj **diversajn** lingvojn, al plifaciligado la aliron al **diversaj** mondkonceptoj.

Se esperanto vere volas esti lingvo universala, ĝi devus doni neniujn ŝancojn krei eĉ surogaton de iu "nacio" esperanta, sed bedaŭrinde ĝi donas - ekzistas standardo kaj himno. Same la ideo de movado olimpica estos

sensenca tiom longe kiom sportistoj reprezentos ŝtatojn kaj naciojn - ili devus reprezenti nur sin mem. La sento aparteni al iu grupo au komunumo - jen la unua paŝo al netoleremeco, ŝovinismo kaj aliaj malplezuraj fenomenoj. Esperanto devus resti tute senhierarkia, amorfa spaco lingva alirebla por ĉiuj.

Sed en tio aperas ĉefa malfacileco: tiel nomata statistika homo pereas preskau tuj en spaco kaj tempo senigita de hierarkio, direktoj kaj referencpunktoj; alie la individuoj, kiuj jam multajn jarojn pene laboris por disvastigi siajn imagpovon kaj konscion kaj daŭre pri tio laboras. Sed tiaj homoj estas malmultegaj. La plimulto devas havi punktojn direktodonajn: simbolojn, emblemojn, himnojn, standardojn, festotagojn, datrevenojn, estrojn, heroojn. El tio rezultas cirklo erara kaj sorĉita.

Se temas pri ia ara ilumino multe indikas ke tiu maleblas. Oni audis kaj legis nur pri iluminataj uloj, neniam pri iluminata nacio. Amaso da saĝuloj estas same stulta, malklera, agresiva, kriema kaj senpensa kiel iu alia amaso.

Do ni atentu - trodozita kuracilo povas mortigi anstataŭ sanigi; ni ne troigu, por ke ni, pro tro intensa sanigado kaj savado, ne devu enlistigi nin mem en la ruĝan libron de specioj endanĝerigitaj je malapero.

Carlos Castaneda promenis iam sur homoplena strato kun Don Juan, sia gvidisto je la pado ŝamana. Neatendite li rimarkis limakon pene rampantan trans la trotuaro. Li prenis ĝin kaj portis en arbustaron. "Kial vi faris tion?" - demandis lin mirigita Don Juan. "Ja ĉi tie iu povus tretpisti ĝin." "Kaj tie iu povas ataki ĝin kaj manĝi." Konsternita Castaneda enpensiĝis kaj respondis: "Do mi reportos ĝin ĉi tie." Kaj Don Juan: "Sed ĉi tie iu povas tretpisti ĝin... Do lasu ĝin. Senhelpa vi estas tiukaze. La limako simple malbonŝancis ke ĝi renkontis je la vojo de sia vivo Castaneda la stultulon."

Adreso de la aŭtoro: Radoslaw Nowakowski
Dabrowna Dolna 41
PL 26-010 Bodzentin
POLLANDO

RECENZO:

Harald HAARMANN

La LINGVOMONDO de EUROPO

"DIE SPRACHENWELT EUROPAS -
Geschichte und Zukunft der Sprachnationen zwischen Atlantik und Ural"

Campus Verlag GmbH, Frankfurt/Main (D), 1993
ISBN 3-593-34825-X (374 S., 15 Abb., 68.- DEM)

En antaŭa recenzo ("La serĉado pri la perfekta lingvo", Sci.Rev. 1994:45:2(165) p.46-51) estas menciita tiu ĉi libro, kiu meritas atenton en konteksto kun Esperanto antaŭ ĉio pro la fakto, ke la aŭtoro ne estas semiotikisto, sed lingvistikisto.

Komenca parto montras profundajn statistikojn pri ĉ. 75 parolitaj lingvoj en Europo kaj en Kaukasio, kie oni parolas 37 autoĉtonajn lingvojn kaj ankoraŭ 20 aliajn, (el kiuj nur 19 havas skriblingvan normon).

Estas konate, ke en Europo ĉiu estas kulture fiksita al sia lingvo. La problemo de la "komuna europa domo" estas sekve la integrado de la lingvo-naciismo en novan kulturan identecon ("europo-ideo") baziĝonta sur la pluralismo de la naciaj lingvoj resp. lingvo-nacioj. Ĉar ŝtataj terenoj ofte estas pli vastaj ol la historiaj lingvo-terenoj de la enloĝantaj popoloj necesas protektado de tiuj lingvaj minoritatoj. Lingvo-problemoj en iu ŝtato estas ĉiam politikajo. Pro tio necesas klaraj difinoj de ĉiuj esprimoj kiuj koncernas la interrilatojn inter lingvanoj kaj socio, komunumo, popolo, nacio, ŝtato ĝis supranaciaj komunumoj. La lingvo-uzo, eĉ la oficiala, povas havi multajn aspektojn: dialekta, administrada, kanceleria, popola, nacia, ŝtata, interŝtata.

La aŭtoro elmontras multajn trafajn faktojn el la historio, ekz. la plej maljunan konatan dekreton pri protekto de landaj lingvoj en oficialaj dokumentoj ene la romia imperio. Tia agnosko signifis frua revalorigo de lokaj lingvoj je kosto de la latinlingva universaleco.

Anloga signifo havis la historia eksperimento de la frua soveta lingvoplanado sub la iniciato de Lenin kun la celo de socia egaleco. Tiam estis skribigitaj multaj ne-rusaj lingvoj kun samtempa konsolidigo de la foneta kaj morfologia sintakta baso; poste okazis modernigo per neologismoj. Oni nombris en 1989 78 skriblingvojn, la plej multaj ne skribitaj antaŭ 1917;

Internacia Scienca Asocio Esperantista